

## MONS. TOMASI: REALIĜAS TUTMONDIGO DE TERORISMO SUBTENATA DE TEKNOLOGIOJ KAJ MONO

Internacia sinteno koncerne terorismon devas preferigi viktimojn kaj ne financajn, politikajn kaj ideologiajn interesojn – diris konstanta observanto de la Apostola Seĝo ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Ĉefepiskopo Silvano Tomasi tie la 1-an de julio 2015 parolis en la 29-a kunsido de Konsilio de UNO por homaj rajtoj pritraktanta efikojn de terorismo je vivo de unuopuloj kaj ŝtatoj.

La tiel nomataj Islama Ŝtato, Boko Haram kaj al-Káida kaj dekoj da pluaj, kiuj tenas en la manoj mitraletojn kaj en la animo malklaran sopiron volas ŝanĝi la mondon per sangelverŝo de senkulpuloj. La ĉefepiskopo ilin listigis kaj diris, ke de la jaro 2000 ĝis hodiaŭ la nombro de la viktimoj plialtiĝis je 500 %. Nur en la jaro 2013 estas 82 % de tiuj viktimoj mortigitaj en kvin landoj: Irako, Afganistano, Pakistano, Niĝerio kaj Sirio. Se la internacia komunumo ne trovos manieron, kiel komune kontraŭstari „senpunecon“, kiun teroristoj ĝuas, konstatis la vatikana diplomato, la situacio ankoraŭ pli malboniĝados. Terorismo, kiu senigis milionojn de homoj je fundamentaj rajtoj kaj liberecoj, estas antitezo de dividitaj valoroj kaj strebadoj, kiuj estas fundamento de la nacia kaj internacia kunvivado. Estas evidente, diris la ĉefepiskopo Tomasi, ke „ekzistas tutmondigo de terorismo subtenata de antagonismaj politikaj potencoj, kiuj strebas realigi sian influon per tio, ke ili liveras al integral-

ismaj organizaĵoj modernan teknologion, modernajn armilojn kaj monon, kio havas dramatan humanan kaj socialan sekvon“.

„Terorismo ne konas homan dignon de siaj viktimoj,“ diris plue la vatikana diplomato, „kaj estigas dominantan efekton per tio, ke ĝi forneas rajton je vivo, misuzante ĉiujn fundamentajn rajtojn. Tie, kie terorismo evidentiĝis, ĝi kaŭzis ankaŭ neripareblajn socialajn kaj kulturajn damaĝojn, kiuj evidentiĝos en venontaj generacioj. Terorismo humiligas la socion surgenuen kaj kreas neelireblan cirkolon de perforto.“

La konstanta vatikana observanto ĉe UNO ankaŭ parolis pri influoj de terorismo je demokratio. Iuj ŝtatoj uzas minacon de terorismo kiel „pravigon“ por reduktado de la fundamentaj liberecoj. Sed la ĉefepiskopo Tomasi akcentis, ke la Apostola Seĝo estas profunde konvinkita, ke kontraŭstari terorismon precipe en tiuj ĝiaj formoj, kiuj deriviĝas el religia ekstremismo, estas necese kontraŭstari per koncentrita politika strebado de ĉiuj lokaj kaj regionaj flankoj, kiujn tio koncernas. Sian alparolon en kunsido de Konsilio por la Homaj Rajtoj en Ĝenevo li finigis per la vortoj: „Streboj pri komuna agmaniero en batalo kontraŭ terorismo devas ĉiam preferigi viktimojn. Financaj, politikaj kaj ideologiaj motivoj devus neniam superi la apartajn komprenojn de la neceso kontraŭ terorismo batali“. ■ [www.radiovaticana.cz](http://www.radiovaticana.cz)